n-ro 56

aprilo 1997

## Interretemaj kooperativoj serĉataj

Ĉu ekzistas kooperativoj, Esperantaj aŭ ne-Esperantaj, kiuj volus aperi en TTT-a listo? Mi kunlaboras por interligi finnajn kooperativojn interalie per Interreto. Ligoj de la TTT-paĝaro al aliaj landoj estas dezirataj. Ĉu Esperanto helpos por tio? Poste mi povos fari apartan Esperantan paĝon pri la Esperantaj ligoj.

La ĉefa paĝo estas en: http://event.jyu.fi/wuokko/

Kontaktu s-ron Matti Lahtinen, JyvSigmaskylSigma, Finnlando, <matlah(a)sci.fi> aŭ skribu al Roland Rotsaert, kiu transsendos.

## Informkunvenoj de IKEF dum 1997

* okaze de la Eŭropa kongreso en Stuttgart je sabato 17 majo
* dum la Universala Kongreso de Esperanto en Adelajdo

## Enhavo

Grava atentigo al ĉiuj membroj . . . . . . . . . . 3
Raporto pri la agado de IKEF dum 1996 . . . . . . . . . . 4
Financa raporto . . . . . . . . . . 6-7-8
Anoncitaj aranĝoj . . . . . . . . . . 10
Komercaj pretoj kaj proponoj - Novaj membroj . . . . . . . . . . 11

**La Merkato** (LM) estas organo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare kaj servas al la membraro kiel komuna komunikilo.

La **Identecŝildaro** estas dujara eldono por la membroj de IKEF. Ĝi ne estas aparte vendata.

La **Estraro de IKEF**: S-ro Franz Josef Braun, Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario; S-ro Roland Rotsaert, Financa Konsilanto; D-ro István Gether, S-ro François-Xavier Gilbert; D-ro Marco Picasso; S-ro Seikô Yamasaki; S-ro Daniel König.

**Revizoro por la financa raporto**: D-ro Gianfranco Polerani.

**Centra sidejo**:

Ĉe s-ro Frans Josef Braun, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl, Germanio.

**Financa sidejo kaj membrara administrado**:

Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio,
telefono + fakso: +32-50-330004; retpoŝto: rotsaert(a)knooppunt.be.

Atentu !

Parto de La Merkato estas sendata tra Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpen. Tio estas nur sendadreso; korespondaĵoj senditaj al tiu adreso ja alvenas, sed kun prokrasto. Prefere uzu unu el la supraj adresoj.

---

**La jara membreca kotizo** estas 600 belgaj frankoj (BEF) por landoj laŭ UEA-kategorio "A" ("riĉaj landoj") (aŭ egalvaloro: 30 NLG, 30 DEM, 20 USD) kaj 400 BEF por landoj laŭ UEA-kategorio "B" ("malriĉaj landoj") (20 NLG, 20 DEM aŭ 14 USD).

Dumviva membreco akireblas pere de unufoja egalvalora pago de la 20-obla membreca kotizo.

**Kontoj**: - Ĉe UEA kaj FEL: kodo ikef-c
- belga poŝtĉekkonto (Bruselo): numero 000-1592629-83

Ankaŭ eblas pagi per **eŭroĉeko** (en belgaj frankoj, kun kartonumero dorse) sendota al Roland ROTSAERT, kaj per internaciaj respondkuponoj (1 IRK = 34 belgaj frankoj).

**Perantoj**:

*Ĉinio*: S-ro **WANG Tianyi**, Xi'an Esperanto-Asocio, Xiyinglu 74 hao, CN-710054 Xi'an

*Francio*: S-ro François-Xavier **GILBERT**, 33, rue Louvière, F-55190 Void-Vacon
(CCP 1275-89 L Nancy)

*Germanio*: S-ro Franz Josef **BRAUN**, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl (Volksbank



Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400)

*Hungario*: D-ro István **GETHER**, Palóc u. I, H-1135 Budapest XIII

*Italio*: D-ro Marco **PICASSO**, via de Gasperi 7, I-20057 Vedano al Lambro

*Japanio*: S-ro **YAMASAKI** Seikô, J-185 Tôkyô, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12; retpoŝto syama(a)dokkyo.ac.jp (pĝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 2200 enoj)

## Administrado

**Grava atentigo al niaj membroj !**

1. La estraro prezentas sur la sekvaj paĝoj sian raporton pri la agado de IKEF dum la jaro 1996 kaj proponas aprobon de tiu raporto.

2. La estraro prezentas sur la paĝoj 6-8 la financan raporton de IKEF por la jaro 1996, notante ke la ciferoj estas prezentitaj en bona tempo al la revizoro. D-ro Polerani juĝis ilin bonaj kaj en ordo. Tial la estraro proponas aprobon de tiu financa raporto.

3. La estraro notas la sumon de financa profito de 4948 BEF kaj proponas aldonon de tiu profito al la kapitalo.

4. La estraranoj d-ro Gether, s-ro Gilbert, s-ro König, s-ro Rotsaert kaj s-ro Yamasaki, ĉiuj elektitaj en 1995, baldaŭ estos du jarojn en sia ofico. Laŭ la statuto de IKEF, alineo 7.1, dua frazo, estrarano tenas sian oficon por du jaroj. Ilia estraraneco finiĝos en julio ĉi-jare. Relekto eblas. Ĉiuj pretas kandidatiĝi. En la nomo de IKEF, la aliaj estraranoj dankas ilin pro la laboroj faritaj dum la pasintaj du jaroj kaj proponas reelekton de ili.

5. Nia statuto, alineo 7.4, montras la proceder pri aprobo de la financa raporto kaj de la raporto pri la agado. Ĉi-jare ni ne aranĝos oficialan Ĝeneralan Kunvenon dum la Universala Kongreso en Adelajdo. Por tia kazo la statuto preskribas, ke aprobo de ambaŭ raportoj sekvos aŭtomate du monatojn post publikigo, krom se pli ol duono de la membroj skribe al la Ĝenerala Sekretario (Prezidanto) indikas malakcepton. Do, se vi intencas malaprobi la raportojn, bonvolu indiki tion al la prezidanto kun nomigo de kaŭzoj du monatojn post ricevo de ĉi tiu numero de La Merkato.

6. Nia statuto, alineo 8, montras la procedon pri elekto de estraranoj. Ĉar ĉi-jare ne okazos oficiala Ĝenerala Kunveno, la elekto de membroj de la estraro okazos per skriba voĉdonado perpoŝte. Bonvolu sendi ĝis 1997-06-30 vian elekton skribe al nia prezidanto, s-ro Braun, kiu administras la elektan procedon. Ĉiu membro havas <u>5 voĉojn</u>, ĉu por reelekto de estraranoj menciitaj en paragrafo 4, ĉu por nomi aliajn kandidatojn. Jen la adreso de s-ro Braun:

   S-ro Franz Josef BRAUN



Hornisgrindestr. 8, D-77815 BÜHL, Germanio

7. Tamen IKEF okazigos kadre de la Universala Kongreso en Adelajdo informkunvenon, en kiu ni diskutos kun ĉeestantaj membroj kaj aliaj interesitoj pri celoj kaj agadoj de IKEF. La precizan daton kaj horon kaj la salonon de la informkunveno ni avizos en la venonta La Merkato. Krome, estos informkunveno dum la Eŭropa Kongreso en Stuttgart, je sabato 17 majo 1997.

## Raporto pri la agado de IKEF dum la jaro 1996

**Membraro kun stabila tendenco**

La membraro denove kresketis de 121 fine de 1995 al 126 fine de 1996. Inter ili troviĝas tri dumvivaj membroj.

**La Merkato regule aperis**

Dum 1996 nia komunikilo La Merkato regule kaj akurate aperis kvarfoje.

La nova emblemo de IKEF, unuafoje aperinta sur La Merkato n-ro 50 en oktobro 1995, intertempe estas vaste enkondukita kiel "domstilo" de IKEF, ne nur sur La Merkato, sed ankaŭ sur leterpapero kaj aliaj dokumentoj.

**IKEF en Interreto**

Agrabla novaĵo fine de la raporta jaro: Dank'al nia nova membro Bent Holm (IKEF 230) IKEF ĉeestas interreton (Internet). Per la adreso http://www2.dk-online.dk/users/TeamHolm/ikef.htm oni povas aliri la paĝojn pri IKEF. Iuj membroj havis problemojn por konsultu la IKEF-paĝojn. Ili bonvolu informi la prizorganton, s-ron Bent Holm <teamholm(a)dk-online.dk>.

**Terminara Sekcio reagadis**

La Terminara Sekcio sub kunordigado de s-ro Yamasaki rekomencis sian laboron. Ĝustatempe por la UK en Prago ĝi prezentis novan laboron, nome la Esperanto-version de la "Glossaire du monde du travail et du mouvement syndical" de la Eŭropa Unio. Ni nomis ĝin "Sindikata Terminaro". Ĝi enhavas 415 nociojn indikitajn en la lingvoj germana/angla/franca/Esperanto, kun Esperanta indekso kaj kun "domstila" eksteraĵo. Intertempe ni prezentis la Sindikatan Terminaron al la Komisiono pri Ekonomio de la EU kun la propono, ke ili aldonu ĉe reeldono Esperanton kiel plian lingvon al la 11 oficialaj lingvoj de EU.

**Kongresaj aranĝoj**

Rekorda estis en la raporta jaro la nombro de kongresaj aranĝoj kun partopreno de IKEF.

Dum la UK en Prago okazis la Ĝenerala Kunveno kun 55 ĉeestantoj, inter ili 23 membroj. La kunveno plenumiĝis laŭ tagordo, kun vigla diskutado pri la celoj de IKEF. Estraranoj Braun kaj Picasso estis reelektitaj.

Dum la kongresa semajno oni aranĝis renkontiĝon kun reprezentanto de la ĉeĥa Komerca Ĉambro en Prago. Partoprenis 25 personoj. S-ro Laczó informis pri la nuna stato de la ĉeĥa ekonomio sep jarojn post la politika turniĝo. La prelegon de li kaj la sekvan diskutadon interpretis ĉeĥe-Esperante nia membro d-ro Petro Chrdle (IKEF 171).

La 65a Itala Kongreso en Ferrara fine de aŭgusto 1996 havis la ĉeftemon "La internacia komunikado en la malgrandaj kaj mezgrandaj entreprenoj". Tio estis pritraktata dum du tagoj en la konferenca salono de la Komerca Ĉambro en Ferrara. IKEF estis reprezentata per pluraj membroj. Per prelegoj kontribuis s-roj Braun (IKEF 4), Franquesa (IKEF 228), Gilbert (IKEF 14) kaj König (IKEF 54).

Kadre de la 1a Azia Kongreso en Ŝanhajo, Ĉinio, okazis speciala IKEF-informkunveno sub gvidado de estrarano Yamasaki (IKEF 43) kaj ĉina peranto Wang Tianyi (IKEF 117). Ĉeestis 26 personoj. Oni diskutis pri celoj kaj agadoj de IKEF.

Pri ĉiuj aranĝoj ni detale raportis en La Merkato n-ro 54 de oktobro 1996.

**EBU mortis - Tamen verka agado denove sur rimarkinda nivelo**

Dum la jaro 1996 IKEF estis trafita de grava perdo. Pro personaj cirkonstancoj de la aŭtoro (d-ro Goldman, IKEF 52), la "Ekonomia Bulteno pri Usono", post multjara regula apero, ĉesis. Jam delonge ni intencis eldoni similajn bultenojn pri la ekonomia situacio en Eŭropo (precize: Eŭropa Unio) kaj en Orienta Azio (eventuale nur Japanio). Pro manko de sinproponantaj kunlaborantoj tiuj bultenoj ĝis hodiaŭ ne realiĝis. Tiom pli dolora estas nun la malapero de tiu pri Usono.

En Monato, esperantlingva internacia magazino sendependa por politiko, ekonomio kaj kulturo, du IKEF-membroj estas responsaj redaktoroj pri iu fako: Roland Rotsaert (IKEF 3) por ekonomio kaj Yamasaki Seikô (IKEF 43) por lingvo. Krom ili, jenaj aliaj IKEF-membroj kontribuis dum 1996 al Monato per verko de artikoloj: d-ro Werner Bormann (IKEF



27), Daniel Durand (IKEF 187), Gilbert Ledon (IKEF 177), Mu Binghua (IKEF 213), Paul Peeraerts (IKEF 65) kaj Zandandu Ntomono Zola (IKEF 181). Do, la rubriko "ekonomio" en ĉiuj 12 numeroj de la jaro 1996 estis kontentige plenumita. Ĉe tiu okazo ni denove atentigas niajn membrojn pri la fakto, ke Monato estas la ĉefa podio por nia verka agado, kaj ni rekomendas al ili la abonon de Monato.

**Praktikaj agadoj**

En Monato aperis reklamanonco de germana firmao. Ni opinias, ke la perado de tiaj anoncoj al Monato kaj aliaj Esperantlingvaj magazinoj estas unu el la plej efikaj agadoj.

BEK, Bulteno de Esperanta Komerco, de nia ĉina peranto Wang Tianyi (IKEF 117) - pli precize revueto pri anoncoj kaj deziroj al vendo/aĉeto de varoj aŭ diversaj servoj - daŭrigis sian aperadon per ok numeroj en 1996. La eldonkvanto estas pli ol 600, el tio ĉiu IKEF-membro ricevas ekzempleron.

En ĉiu La Merkato aperas komercaj petoj kaj proponoj de Esperantistaj komercistoj. Ni aperigas ilin senpage por homoj el landoj kun pagoproblemoj. Bedaŭrinde ni ne ricevas informon pri la sukceso de tiaj anoncetoj.

| Sur la mezaj paĝoj estas la ciferoj de la financa raporto |
| --- |

Nia membro, s-ro Kees Ruig (IKEF 68), lanĉis en la Centra Gelderlanda Ĉambro pri Komerco kaj Industrio en Nijmegen (Nederlando) kun la loka Universitato studaĵon pri la taŭgeco de novaj merkatoj ekster okcidenta Eŭropo por etaj kaj mezgrandaj entreprenoj. La resumon en la 136paĝa libro, s-ro Ruig presigis ankaŭ en Esperanto.

Okaze de vizito en Brazilo dum novembro 1996, prezidanto Braun vizitis lokajn Esperantistojn kaj faris prelegon pri la ekonomia situacio en Eŭropo ĉe la E-grupo São Paulo.

IKEF disdonis donace al ĉiuj siaj membroj la broŝuron "La aboco de tempoplanado" de Lothar J. Seiwert.

**Resumo**

La jaro 1996 alportis al nia fakgrupo nur etan progreson; tamen progreson, se oni konsideras la ĝeneralajn malfacilaĵojn por Esperanto kaj la fakton, ke niaj membroj plejparte estas profesie okupitaj homoj, kiuj ne disponas pri sufiĉe da libera tempo.

Ankaŭ ĉi-foje ni ripetas, ke la taskaro troviĝanta sur la kampoj komerco, ekonomio kaj ekonomiko estas tiom giganta kaj fruktopromesa por ni, ke ni sen ia dubo havos progreson, se ni intensigos nian aktivecon. Al tio ni invitas vin ĉiujn. Supozeble la pligrandiĝinta nombro de membroj iom post iom sekvigos pliajn rimarkeblajn progresojn.

F.J. BRAUN, prezidanto kaj ĝenerala sekretario

**Financa raporto pri la jaro 1996**

Post altigo de la kotizo por parto de la membraro, IKEF retrovis financan ekvilibron. Por 1996 estas pozitiva rezulto de 4948 BEF. Dum la pasinta jaro eĉ estis eblaj kelkaj specialaj agadoj. Komence de 1996 ĉiuj membroj ricevis ekzempleron de "ABC de tempoplanado". Tiu elspezo estis parte kompensita per donaco de la prezidanto (7717 BEF). Alia speciala agado estis la aldono de "Bulteno de Esperanta Komerco", eldonita de la ĉina IKEF-peranto, al kelkaj numeroj de La Merkato. Pro la malgranda kosto, tiu lasta agado ne estis aparte librotenita kaj troviĝas inter la kostoj de la IKEF-revuo.

La ĝeneralaj kostoj i.a. enhavas kotizon de UEA (aliĝinta faka asocio), luo de salono kaj materialo dum UK, ktp. En 1996 la saldo de tiu konto estis pli alta ol kutime, ĉar ankaŭ enestas la vojaĝkostoj de estraranoj Braun kaj Gilbert al kongreso en Italio. Tamen, ambaŭ estraranoj donacis sumon egalan al sia kostoj, tiel ke la fina rezulto je la spezokonto estis neŭtrala.

Evidentiĝis ke kelkfoje la kvanto de disponebla mono ne sufiĉis. Pro tio necesis forpreni parton de la ŝparkonto. La rento je la ŝparkonto nun denove rilatas al unu jaro (en 1995 estis librotenita rento de du jaroj). Venontan jaron la cifero ankoraŭ pli malgrandiĝis, pro malpli alta saldo kaj ĉar FEL, sekvante la merkaton, decidis malaltigi la renton je ŝparkontoj.

Reklamkampanjo pri la Komerca Terminaro ("La lastaj ekzempleroj...") kreskigis la vendokvanton dum 1996. Restas kelkdekaj ekzempleroj.

Por la reeldono de la IKEF-informilo la baza desegno de la leterpapero kaj la revuo estis uzata; pro tio ne estis kostoj. Ĝi estas fotokopiata laŭbezone. Petoj por desegni reklamanoncojn por IKEF ĝis nun ne havis rezulton. Tiaj reklamanoncoj utilus por konigi IKEF tra la esperanta kaj ne-esperanta gazetaro.

Roland ROTSAERT, Kasisto

**Donacoj**

La kasisto dankas jenajn membrojn pro donacoj faritaj dum 1996: Basso 120 BEF, Braun: 7717 + 11083 BEF, Bühl 412 BEF, Dengler 412 BEF, Gilbert 8643 BEF.

**Asekura Terminaro preparata**

Marc Vanden Bempt (Belgio) preparas plurlingvan Asekuran Terminaron. Lin asistas kiel revizianto Hans Wiersch (Germanio). Oni esperas aperigi la terminaron ankoraŭ en 1997.

**Telefonado: novaj landkodoj por Ĉeĥio kaj Slovakio**

Ekde la 1a de marto 1997 la landkodoj iĝis +420 por Ĉeĥio kaj +421 por Slovakio.

PC



**Anoncitaj aranĝoj**

**Bydgoszcz, Pollando**, 26 aprilo - 4 majo 1997: Pola Studsesio de AIS. Kontaktadreso: Mag. Joanna Lewoc, Karl-Schwarzschild-Weg 6/317, D-37077 GÖTTINGEN, Germanio.

**Rafina, Grekujo**, 12-18 junio 1997: Internacia Esperanto-Konferenco. Ĉeftemo: Helenaj influoj en la mondkulturo. Organizas: OSIEK. Informoj: Eric Laubacher, 1 rue des Vosges, F-78180 Montigny-le-Bretonneux, rete: Eric.Laubacher(a)mail.dotcom.fr;
TTT: www.teaser.fr/~elaubacher/OSIEK.

**Rimini kaj San-Marino, Italio**, 30 aŭgusto - 5 septembro 1997: 3a Itala Studsesio de AIS lige al la 18a Sanmarina Studsesio.

**Siano, Ĉinio**, 1-5 novembro 1997: Ekonomia-komerca kunveno. Temo: sperto kaj leciono; ofertaj kaj kunlaboraj kunsidoj. Informoj: s-ro WANG Tianyi, Xi'an Esperanto-Asocio, Xiyinglu 74, CN-710054 XI'AN, fakso 0086-29-7218042, telefono 3212171, rete xty(a)xanet.edu.cn.

**Fakaj manuskriptoj bezonataj !**

Eldonejo MZ-Verlag (s-ro Harald Schicke, IKEF 185) deziras ricevi fakajn manuskriptojn. Pro manko de taŭgaj manuskriptoj ĝia eldonado en Esperanto stagnadas ! Informoj pri la eldonejo (en germana kaj Esperanto) haveblas tra:
http://www.freieheilpraktiker.com/esperant.htm
Retadreso: harald.schicke(a)t-online.de.

**Identecŝildo**

**Nomo: Gerhard HIRSCHMANN [hirŝman]** **Membronumero: 194**

**Profesio: dipl.inĝ. (FA), merkatlaboro, personartrejnado, komunikado**

**Naskiĝjaro: 1939**

**Nomo de la firmao: GHMarketing**

**Adreso: Zur Siedlung Reform 11/2, D-39118 MAGDEBURG, Germanio**

**Telekomunikado:**
**tel. profesia: +49-391-6 21 35 99**
**tel. privata: +49-391-6 23 10 36**
**fakso (ĝenerale): +49 391-6 23 10 35**
**survoje: +49-172-390 49 25**
**rete: gerhard.hirschmann(a)t-online.de**

**Proponataj servoj:**

**Konceptoj, konsultado por merkatlaboro, prelegoj kaj instruado pri merkataferoj, trejnado por vendistoj, sistem-inĝenieroj por debitado, personaro en servado-tasko ktp., trejnado ĝenerala por komunikado, konceptoj, planado, ktp.**

**Lingvaj kapabloj: germana, parte rusa kaj angla**

## Komercaj petoj kaj proponoj

### Albanio

Je dispono de firmao KARAJANI estas sablaj bitumoj (9,3% da pura bitumo) kiuj elteriĝas en Albanio. Rezervoj atingas 13 milionojn da tunoj. Oni utiligas la sablan bitumon por surtavoligi straton, por produkti puran bitumon, por fabriki brikojn... Prezo: 10 USD (FOB). Pago: L/C. Kontaktu tra telefono/fakso +3554223972.

### Ĉeĥio

La ĉeĥa transporta firmao ELTSEN certigas:
- internacian kaj enlandan kamionadon
- doganajn servojn, deklarado, deponado, k.a.

ELTSEN proponas siajn spertojn kaj sciojn post dujara praktikado en Eŭropo. Kontaktu nin ! ELTSEN malfermiĝas al pliaj komerc-aktivadoj. Komunikado en la lingvoj angla, ĉeĥa, Esperanto.
Kontaktadresoj:
ELTSEN, Jana Nohy 1237, CZ-256 01 BENEŠOV (samloke doganejo)
tel. (lingvoj angla+ĉeĥa) +420/301/22251-4, fakso 22385, Esperanto 21018
ELTSEN, Sokolovská 22, 110 00 PRAHA 1 (samloke doganejo)
tel. (lingvoj angla+ĉeĥa) +420/2/24815735, tel.+fakso 2312300

### Hispanio

Llavisan S.A. fabrikas kranojn kaj ilaron por banĉambroj kaj kuirejoj. Kontaktu: s-ron José Montesinos Marin, direktoro, Camino Azagador s/n, E-46117 BETERA (Valencia); fakso (96)160.11.00.

### Ruslando



Sperto pri aŭtorrajtoj, sportaj aparatoj, sukeraĵoj; merkatado de videokasetoj; akcioj de siberiaj naftaj kompanioj kaj de konzerno "Norilska Nikelo"; reprezentado en Krasnojarska regiono.
Inĝ. Evgenij TENJAKOV, posto 8, abono 4, 662800 MINUSINSKO.

## Novaj membroj

236. S-ro Guido GENTILE, Via Pasubio 27, I-31100 TREVISO, Italio; °1958; telefono +39 422 400255, fakso 401039, reto g.gentile(a)agora.stm.it
237. S-ro James ZHENG, Sun tong New Village 9-205, CN-315300 CIXI CITY, ZHEJIANG PROV., Ĉinio; °1967; telefono+fakso 00-86-574-3014043 reto espero(a)mail.nb.go.cn
238. S-ro Václav STIBŮREK, Jiřího Franka 1731, CZ-25601 BENEŠOV, Ĉeĥio; °1941; telefono +420/301.21018, fakso 301.22385
239. S-ro Jiří CALETKA, Na nábřezí 11, CZ-746 01 OPAVA, Ĉeĥio; °1958; telefono +42 653 218601, fakso +42 653 211748
240. S-ro Antanas RAMONAS, P.O.Box 15, LT-5030 KEDAINIAI, Litovio; telefono+fakso +370 57 57310, reto ly3nes(a)org.ktu.lt